

Heinrich Heine,
 Kie, laca vagabondo
tradukita de Kálmán Kalocsay

Kie, laca vagabondo,
 trafos mi al lasta hejm'?
 Ĉu sub suda palmofrondo?
 Sub tilio apud Rejn'?

Ĉu min en dezert' enfosos
 haste ies fremda man',
 aŭ en sablo mi ripozos
 borde de la ocean'?

Kie ajn! Min la ĉieloj
 brakos, kiel tie ĉi,
 kaj funebro-lampe steloj
 ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo “Grabspruch” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaločajo, *1911 – †1976).*

Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)

Heinrich Heine,
 Tombosentenco
tradukita de Manfredo Ratislavo

Kie estos ripozejo
 lasta de migranto mi?
 Ĉu sub palmoj en forejo?
 Aŭ ĉe l' Rejno sub tili'?

Ĉu enfosos min malpie
 iu en dezerta land'?
 Aŭ ĉu mi ripozos ie
 en la sablo de marstrand'?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
 la ĉiel' de l' granda Di',
 steloj tie ĉi kaj tie
 lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo “Grabspruch” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1993.*

MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)